# Kajeroj el la Sudo

ISSN 1886-1997

La 31ª jaro

Bulteno de la Hispana Asocio de Laboristoj Esperantistaj

http://www.gazetoteko.com/kajeroj/k117/k117.html

*Ne estas pli demokrata tiu, kiu diras tion, sed tiu, kiu montras tion*

## Estantismo: ignoranta reviziismo de historio




Nº 117ª

Oktobro 2020

# Kajeroj

*Bulteno de la Hispana Asocio de Laboristoj Esperantistaj (HALE).*

el la Sudo

Calle Jabonerías, 6.3º D
30010 Murcia
Hispanio

ISSN 1886-1938 (printita)

Prezidas: **Johano A. Cabezos.**
Redaktas: **Jesuo de las Heras.**
Korektas: **Jozefo Pina.**
Retskribu al: **kajeroj@gmail.com**


# Enhavo


**Redaktore**: Kia estas demokrata? 3
**Politiko**: Nigraj vivoj ne gravas........4
Tial Socialismo vundas socion.........6
Estantismo......................................11
**Kulturo**: Ĉu nobelpremioto?...........10
**Psikologio**: La 6 bazaj emocioj...18
**Literaturo**:
**Recenzo**: Ni amas Maron Minoran. 14
***Sanigaj murdoj***: ĉ 3ª, La krizo. 15
***La Faraono***, ĉ. 66ª.....................19


**Pri la enhavo de la artikoloj respondecas ties aŭtoroj, ne la redakcio.**

**Ni ne korespondos pri nepetitaj artikoloj, kvankam ni klopodos publikigi ĉiun artikolon, kiun ni trovos interesa kaj kies enhavo mistraktas neniun personon.**

**Kovrilo**: **Estantismo** estas kultura manko kaj ksenofobio kaj rasismo esence.

Eble oni ne aŭdis ĉe vi, ke Prezidenton Trumpon oni proponis por Nobel Premio pro lia atingo paca inter judoj kaj araboj, kaj ankaŭ ĉar li rehejmenigas la usonajn trupojn el Afganistano kaj Irako.



Nesubskribitajn artikolojn verkis la redaktoro.

Pagmaniero: aliĝu al HALE kontraŭ €10 jare por ricevi la surpaperan version de nia magazino.

Notu, ke malfrua kotizo povas signifi perdi numeron.

Konto **ES62 2038 3123 4260 003 22715**

Notu vian nomon kaj la jaron, kiun vi pagas.
Poste, sendu noton al kajeroj@gmail.com

Ankaŭ eblas protekti la magazinon pere de donaco al la menciita konto, se oni deziras helpi kaj tamen ne ricevi la surpaperan version.


**Oni povas reprodukti la enhavon, kondiĉe, ke oni citu la originon.**


Tute kreita kaj traktita per senpagaj linuksaj rimedoj: Scribus, Bluefish, BlueGriffon, Gimp, gFtp kaj yafc.

Redaktore

# Kia estas demokrata?

Ja tedas min tiuj, kiuj memdifinas sin kiel demokrataj. Tamen ili voĉdonas en nedemokrataj balotoj. Kaj post kvardek du jaroj mi ne konsideras, ke ili estas senkulpaj naivuloj. Oni ĉiam estu respondecaj pri memagoj.

Demokratio estas sistemo garantianta sendependecon de povoj kaj reprezentiveco de civitanoj, kiuj voĉdonas sciante pri tio, kion ili faras. Ĉu oni deziras mastron dum la sekvonta kvarjara periodo? Ĉu oni deziras reprezentantojn, kiuj agos favore al niaj interesoj? Ĉu ni estas feliĉaj esti nur subuloj de partioj, kiuj serĉos siajn interesojn kaj profitojn kontraŭ tiuj niaj, se ili kolizias? Ĉu ni eltenos, ke registaro trudos sur nin sian ideologion kaj koncepton pri vivo? Jen diferenco inter demokratio kaj tiranio.

De kiam demokratio estis inventata en malnova Grekio, ĉiuj civitanoj interesiĝas pri la publikaj aferoj. Sed poste monarĥoj reprenis povon sur popolojn, kiam ne plu estis civitanoj, sed prifajfuloj devenantaj subuloj. Jes, popoloj deziris estis gvidataj anstataŭ gvidi sin mem kaj lasi administrajn aferojn en la manojn de funciuloj, kiuj formas tion, kion oni konas kiel Ŝtaton. Sed ĉu ni servu la Ŝtaton, ĉu la Ŝtato servu nin? Interesa diferenco inter tiranio kaj demokratio.

De kiam la moderna Hispanio ekhavis tion, kion oni bombaste nomas Demokration, oni suferas troigojn de la Ŝtato fontanta el tiranio de politikaj partioj. Ne gravas, funde, kiu partio regas, ĉar ili ĉiuj faras same, esence: ili bombadas nin per sia ideologio en lernejo kaj televido, kaj nuntempe hispanoj kredas, ke estas demokratio, kaj ke ni, la popolo, regas la landon. Bedaŭrinde tio estas nur revo: se la povoj ekzekutiva, leĝfaranta kaj juĝa ne estas sendependaj unu de la aliaj por efike kontroli unu la aliajn, kaj se aldone ne estas reprezentativeco, tio estas, ke deputitoj reprezentas nin, civitanojn kaj ne partiojn, ne ekzistas demokratio. Sekve ne estas civitanoj en Hispanio, sed subuloj. Do, decas, ke estu reĝo, ne respubliko. Bedaŭrinde jen la situacio en Hispanio, kaj mi dubas, ke tio ŝanĝos en la baldaŭa estonto.

Do, paciencon, respublikoj, paciencon kaj sopiron al libereco kaj respubliko. Iam, se ni vigle agos, aferojn oni ŝanĝos.

*Jesuo, redaktoro*

Politiko

# Nigraj vivoj ne gravas

Ŝajnas, ke mi diras sakron, ĉu ne? Jes, mi asertas serioze, ke nigraj vivoj ne gravas. Ne gravas tiom multe, kiel fanatikuloj kontraŭsistemaj kriaĉas laŭ preskaŭ la tuta mondo, pro tio, ke policanoj mortigis nigrulon en Usono.

Ili ade sloganaĉas per tiu sensenca frazo, kvazaŭ tio kaj nenio plu gravas dum ili detruas statuojn kaj nenigrajn vivojn. Se mortigi estas malbone, kial diable ili mortigas? Estis diversaj komercistoj, kiuj emis defendi siajn negocojn, kaj ili, modestaj homoj, kies vivo dependas el siaj vendejoj, estis mortigitaj de tiuj nerespondecaj batalantoj pri nigra afero, kiuj poste forrabis la aĵojn en tiuj vendejoj. Do kion diable ili defendas? Ĉu **nur** vivoj de nigruloj gravas? Per tiu sensenca sinteno, ili nuligas sian propran agadon. Ili vere diras per ago, ke ili mensogas vorte. Ŝajnas, ke ili forgesis, ke vivoj gravas, ne nur nigraj.

Iliaj agoj ne nur estis murdaj, sed ankaŭ ksenofobaj kaj rasismaj. Ŝajnas, ke nur nigraj vivoj gravas por ili, kaj se estas mortigita blankulo dum tiuj partiaj manifestacioj, ne gravas. Ili eĉ ne priparolas la aferon. Ni memoru la murdojn de David Dorn, David Underwood, Italia Marie Kelly, José Gutiérrez, Víctor Cazares, Ochea Brown, Chris Beaty... Kelkaj el ili estas nigraj, sed la movado BLM (nigraj vivoj gravas) ŝajnas prifajfi pri tio. La leganto konkludu ĉu ĉi tiu movado indas esti defendata. Perforto neniam kontestas perforton, perforton ne nuligas perforto, sed paca laboro ĉiutaga por komprenemo, solidareco kaj paco mem. Veras, ke multajn afrikdevenajn homojn oni mortpafis en Usono, sed



Sajnas, ke tiuj ĉi vivoj ne gravis...

ne nur. Ankaŭ blankulojn oni mortopafis eĉ de policanoj, kiam ili rifuzis obei arestate. Polico devas savi vivojn de senkrimuloj, sed lasi krimulojn fuĝi estas sensenca al tiu celo. Laŭ statistikoj

90% da nigruloj estas murditaj de nigruloj. Kiam polico intencas aresti homon por ke poste juĝisto decidos ĉu li krimis, ĉu ne, oni devas ne rezisti. Sed tiu supo sociala kontraŭpolica en Usono vere ne laboras por justico.

Ni havas ekzemplon tragikan en Calella (kaleĝa), en Katalunio: kiam okazis referendumo senleĝa, antaŭ kelkaj jaroj, la civitanoj de tiu urbo amase forpelis la policon de tie. Oni bonvenigis MENAulojn (neplenaĝaj senleĝaj enmigrintoj), kiam ili venis en la urbon. Hodiaŭ ne estas policanoj tie por kontroli la krimojn faritaj de tiuj uloj.

Esti kontraŭsistema povas esti moda hodiaŭ, sed tio havas grandan koston: onian sekurecon. La politikan sistemon de sia lando oni povas ne ŝati, sed estas la sola aĵo, kiu protektos vin, eĉ vian vivon, se necesas. Kaj batali kontraŭ tio estas batali kontraŭ vi mem, eĉ se vi tion ne ŝatas.

Politiko

## Tial socialismo vundas socion

En Hispanio estas modo, de kiam mi povas memori, esti maldekstrulo. Mi kreskis aŭskultante, ke kiam Franko mortos, venos maldekstroj doni al ni liberecon kaj justecon socialan, kiuj inkluzivas egalecon inter ĉiuj hispanoj.

Mi memoras, ke en tiu edukado, kiun ni ricevis tiutempe, mankis Politika Edukado, spite al tio, ke dum ses kursoj abiturientaj estis studobjekto kun tiu nomo. Tamen, ĝi estis nura propagando pri la Reĝimo de Franko, kun legado partiaj, kiujn oni prikomentis klase kun profesoroj de pruvia lojaleco al Antaŭŝtato. Ĉu tio sonorigas ion?

Ververe, tiu objekto nomiĝis *Edukado pri Nacia Spirito*, sed oni referencis al ĝi per *Politika Edukado*, aŭ simple *Politiko*. Nune oni povas trovi kompendion pri tiu objekto en manlibro verkita por la Unua Kurso de la Lernejo pri Instruado per kindla versio ĉe Amazon' kontraŭ iom pli ol €3.Tiu ĉi objekto, kune kun tiuj pri Religio kaj Gimnastiko, ricevis nomon "marioj", ĉar ili estis tre facile prisukcesataj.

Tiuj kvardek jaroj estis obskuraj pri kelkaj aferoj, spite al ekonomia progreso, plenplena dungiteco kaj industriiĝo kreskanta en la lando. Mankis politikaj partioj maldekstraj, sed tiu reĝimo zorgis pri laboristoj, al kiuj ĝi garantiis dungecon

longdaŭran post la unuaj ses monatoj sinsekvaj, eĉ se veras, ke sindikato estis nur unu, kiu entenis patronojn kaj laboristojn, la Vertikala Sndikato. Ĉe universitato oni havis SEU-on, la Sindikato de Studentoj Universitataj, same kontrolata de reĝimo per junaj policistoj de la Sociala Brigado, sekretaj policistoj, kiuj aniĝis la sindikaton. Kiam oni eksciis pri unu el ili, li mistere malaperis el la universitato. Mi memoras, ke unu el miaj plej karaj amikoj pri klaso kaj penoj malaperis tial, kaj kiam mi eksciis pri la kialo, mi sentis min profunde perfidita, ĉar mi vere ŝatis lian kompanon. Poste mi komprenis, ke mi scias nenion pri li, dum li scias ĉion pri mi...

Ni kreskis, sekve, en polica etoso en kiu oni sentis sin kontrolataj kaj kun neceso priatenti pri tio, al kiuj amikoj oni rakontas kelkajn aferojn. Al mia amiko Kintano neniam mi kaŝis ion ajn, sed miaj aferoj ne devis esti tro danĝeraj al reĝimo, ĉar mi neniam estis arestata, kiel okazis al alia amiko, Oskar', pri kiu mi poste eksciis, ke li estis batita kaj torturita por ke li stukaĉu. Certe li tion faris, ĉar baldaŭ li estis liberigata, fakte la venintan tagon. Ne, ni ne estis herooj, kaj ankaŭ ni ne estas heroaj nun... Sed tio, kion ni ne konis tiam, je la sesdekaj jaroj, estis denuncoj. Kontraŭ Franko oni helpis unu la aliajn. Tiel, kiel slogano de la unuaj jaroj de tiu ĉi postfrankismo maldankema, kiun ni vivas nun, «kontraŭ Franko oni vivis pli bone». Antaŭe neniu sciis pri io ajn oficiale. Nun oni scias ĉion pri ĉiuj, oni juĝas ĉiujn, kaj ĉion oni kondamnas se ĝi ne akoradiĝas al Politika Korektismo. Tio ŝajnas la nazian reĝimon pri ol tiu de Franko.

Jes, tiu senrespiro, tiu asfiksio sociala, kiun oni vivas nun estis nekonataj en la lastaj jardekoj de Frankismo, ĉar najbaroj tiamaj amikaj nuntempe estas denoncistoj, kiuj ne bremsas sin fifamigi aŭ kondamni vin se vi ne samideanas al ili. Nun vi estas faŝisto se vi defias la oficialan dogmon.

Unu el ĉefaj ideoj de tiu moderna katekumenado sociala estas, ke ni ĉiuj estas egalaj. Freneze, ĉu ne? Ĉar evidentiĝas, ke kelkaj el ni esta altaj, aliaj malaltaj, kelkaj belaj, kaj aliaj malbelaj, kelkaj lertaj, kaj aliaj mallertaj, kelkaj diboĉaj kaj aliaj asketaj, kelkaj egoismaj kaj aliaj sindonemaj, kelkaj saĝaj kaj aliaj stultaj, kelkaj blondaj kaj aliaj brunaj aŭ reĝharaj, kaj eĉ ni venas el

diversaj rasoj, temperamentoj kaj opinioj. Kaj tio ĉio laŭ diversaj gradoj, kompreneble, ĉar ne estas bankulo kaj nigrulo en iu ajn de tiuj kategorioj. Ne, ne estas du homoj samaj. Kelkaj estas inoj kaj aliaj viroj, oni diras, ke ankaŭ per diversaj gradoj. Rezonebla estas, laŭ mia modesta komprenpovo, ke al ni ĉiuj oni garantiu la samajn bazajn rajtojn, nome: al vivo, al posedo —kiun ni atingos pere de laŭleĝaj rimedoj— al sano, kaj al libereco pri esprimo kaj penso. Jes, la Hispana Konstitucio de 1978 diras, ke ĝi garantias pli da aferoj, ekzemple dignan loĝadon, sed jam pasis 42 jaroj kaj ankoraŭ registaroj de diversaj partioj aŭ deputitaro ne donacis al mi tiun dignan loĝadon pri kiu mi rajtas. Kaj mi konas neniun homon, al kiu oni jam donacis ĝin. Mi jam scias, male, pri homoj de kiuj bankoj deprenis la hejmojn pro tio, ke ili ne kapablis pagi ties hipotekojn, sed tamen oni garantias fakte okupi loĝejon al tiuj, kiuj neniam pagis eĉ unu eŭron por ili, kaj kiam finfine la juĝisto devigis ilin foriri, post jaroj en juĝejo, neniu repagas la posedantojn pri la detruo kaj malpurigo en kiun manko da higieno submetis la loĝadon, kaj ankaŭ ne pro la kostoj de la procedo kun beno de la registaro. En Hispanio oni perfortas la rajton al posedo ĉiun tagon. Pro eventoj tiaj kaj la fiska persekutado.

Tio okazas, ĉar oni troigas pri la koncepto de egaleco, kiu emfazas tiun pri rajtoj kaj neniigas pri respondeco. De kiam oni devigis sur nin la LOGSE (eduka leĝo je la 80aj jaroj) komencis la egaligon desube, ĝis la punkto, ke en lernejo oni povas supreniri en la sekvontan kurson kun tri malsukcesitaj studobjektoj, aŭ kun ili ĉiuj malsukcesitaj se oni jam ripetis la kurson. Estas egaleco pri promocio, sed ne pri konoj, kompreneble. Kaj tio estas fraŭdo.

Oni povus pensi, ke tiuj aferoj okazas nur en Hispanio, sed tio estas eraro. Kiam socialismo estis trudita en la plej vasta lando el la mondo, Rusio, oni egaligis societon pere de eliminigo de tutaj socialaj klasoj. La popolo rusa ĉiam estis religia kaj ĝi havis socialajn klasojn tre diversajn. Estis *mujiks* (kamparanoj) kun vivo tre humila, kaj aristokratoj, multaj el ili kun titolo princa, kiel rakontas al ni Dostovjeski, Gogol' kaj multaj aliaj rusa literaturistoj tiamaj. Tio ekŝanĝis kiam la rusa popolo proklamis

la respublikon, kaj multe pli kiam Lenin kaj siaj socialistoj puĉis kontraŭ tiu respubliko kaj ekzekutis tutajn tavolojn socialajn sen ĝeni malabolicii la mortopunon, kiun la rusa respuliko jam aboliciis, ĉar laŭ ilia eldiraĵo *la Revolucio estas Super leĝo*.

Same okazis en aliaj landoj, kie socialismo sukcesis, kiel Kubo, Ĉinio, Koreio aŭ Vjetnamio. Reakciuloj ne rajtis vivi.

Nune oni vidas tin emon ankaŭ en Hispanio: ĉiuj ni estas egalaj, kaj sekve ni ĉiuj devas havi la samajn rajtojn. Pri samaj devoj oni ne parolas. Egaleco estas difinita de leĝo: ni ĉiuj estas egalaj antaŭ la leĝo. Tion oni komprenas pri rajtoj, sed neniu rilatas egalecon al devoj. Pro tio oni vidas vicprezidenton fifamigi ĵurnalistojn, aŭ almenaŭ kelkajn el ili, ĉar ili kritikis lin. Tio estas, kelkaj havas rajton ne esti kritikataj, sed ne aliaj. Mi konsideras, ke ne estas bone por socio, ke kelkaj havas pli da bazaj rajtoj ol la ceteraj.

Rajto al laboro estas universala, almenaŭ ties agnosko. Sed kion pri la devo labori? Ni ankaŭ ne estas egalaj pri laboro, verŝajne. Kiam oni ĉeestas lernejon, oni vidas, ke kelkaj lernantoj laboras multe, kaj aliaj tute ne laboras. Eĉ, pro turpeco de la leĝo pri edukado, kiun ni suferas nun, estas lernantoj, kiuj **ne volas** labori, sed ili sukcesas promocii kune kun tiuj de sia sama aĝo, ĉu ili scias, ĉu ne. Tiel oni ricevas promociojn de ignorantoj titolitaj. Kun kelkaj esceptoj, kompreneble. Ĉar, eĉ se oni ne emas kredi tion, kelkaj lernantoj ŝatas studi. Kaj aliaj studas eĉ se ili ne tion ŝatas.

Kiam lernanto ekvidas, ke estas bone scii kaj ke oni scias pere de studo, ties vivo ŝanĝas por ĉiam. Sed, evidente, estas multe da homoj, kiuj trairas ĉi tiun vivon sen scii pri tio, sed kies envio prenas ilin senti koleron kontraŭ tiuj, kiuj ja lernis kaj metas sian saĝecon je la servo de siaj projektoj kaj atingas siajn celojn. La enviuloj sentas sin malsupruloj kaj kolere akuzas la aliajn pri tio, ke «ili kredas sin pli valoraj» ol ili, kaj per tiu sinteno ili mem pruvas sian propran malplivalorecon. Neniu neas al ili egalecon pri sia rajto por voĉdonado, aŭ aliri al edukado, aŭ konsulti kuraciston. Alia afero estas tio, ĉu ili korekte faras tion. Ĉar ne estas same iri en kuracejon banale aŭ nur tiam, kiam oni vere

malbonfartas. Ne estas same ĉeesti lernejon kaj ne lerni ĉar oni ne studas, kiel labori kaj sukcesi objektojn honore. Kaj ne estas same voĉdoni post legadi ĈIUJN partiajn programojn kaj voĉdoni la kandidatojn, kiujn oni opinias, ke ili pensos pri la bonfarto de hispanoj, kiel voĉdoni tiujn, kiujn oni sentas plej proksime al sia ideologio, sengrave al tio, kion ili faros kaj estu iel ajn. Ĉar poste ili tiuj, kiujn oni privoĉdonis pagas per ERTE-oj, kiujn oni ne pagas, aŭ ERE-oj, aŭ per pligrandigo de sendungeco, aŭ per mortintoj, kiuj ne aperas. Per malhonesteco laŭtkriegi serĉante mortintojn de la ŝoseflankoj de la Intercivitana Milito kaj silenti antaŭ nunaj mortintoj en nekonataj lokoj.

Jen **bonoj** de socialismo. Oni vivas en nubo da utopio, kiu pretendas, ke ĉiuj malsamuloj estas samaj. Ĉiukaze ni estas egale diversaj, eĉ se mi ankaŭ tion pridubas...

Por egaligi aferojn, ili insistas, ke «oni devas imponi pli da impostoj» al riĉuloj ol al malriĉuyloj. Ĉu tio estas egaleco? Ĉar ili pledas, ke oni kreskigos la procenton al tiuj, kiuj havas pli da enpagojn. Pro tio oni ne plu havas pli ol unu laborpostenon en Hispanio, tio, kion oni iam nomis plurdungo. Se la Ŝtato volas mono, ĝi laboru. Malfeliĉe la Ŝtato kovras onin per impostoj por pagi subvenciojn kaj salajrojn al tiuj, kiuj ne laboras. La Ŝtato devus ebligi tion, ke tiuj, kiuj volos, povos labori kaj havi postenon, kiuj permesas al si gvidi dignan vivon. Sed ĝi insistas donaci dignan vivon sen devi labori. Kaj de kie ĝi prenos la monon fari tion? De la impostoj de tiuj, kiuj laboras. Per tio ĝi malriĉigas laboristojn kaj malemigas ilin labori.

Dum tiu ĉi Alarmstato mi vidis mire tion, ke memstaraj laboristoj devis ade pagi siajn impostojn eĉ se ili estis malpermesitaj labori rekte de la registaro. Unuafoje en la historio de Hispanio estas imposto pro nelaboro. Por tio utilas socialismo: preni kaj ne doni.

Kaj tamen la Ŝtato pli bone funkcias kiam ĝi estas nevidebla, kiam ĝi prenas malpli da mono, kaj lasas entreprenistojn krei dungopostenojn. Kaj tio ja estas sociala bono, ĉar pli da homoj pagas malpli da impostoj individue, kaj tio ebligas ricevi pli da tiu mono, kiun la Ŝtato bezonas por pagi la servojn, kiujn ni ĉiuj

bezonas.

Hodiaŭaj hispanoj, juĝante el reazultoj de la lastaj popolaj konsultoj elekti deputitojn, suferas ankoraŭ la miraĝon pri egaleco. Kaj ni ne estas egale senhontaj unu al la aliaj, ne. Estas politikistoj kaj ne politikistoj, kiuj profitas siajn postenojn por pligrandigi siajn personajn fortunojn. Politikistoj elektas sian salajron per si mem, kio estas esence malmorala.

Resume, laŭ mia opinio, socialismo havas denaskan pekon, kiu estas la konvinko pri egaleco, ke ni ĉiuj estas egalaj, kaj kiam ili fine sukcesas trudi tiun doktrinon, tiuj, kiuj ne estas egalaj estas ties gvidistoj, kiel Ŝtalino, kiu estis mastro kaj posedanto de la vivoj kaj havaĵoj de duono da mondo, aŭ Nikolao Maduro, kiu havas kaŝitan patrimonion pli granda ol la tuta Kuntara Nacia Produkto de kelkaj landoj kune, eltirante el tio, kion diversaj landaj registaroj konfiskis al li kaj redonis ĝin al Johano Gŭajdo'. Aŭ la filinoj de Hugo Ĉaves, kiuj estas la plej riĉaj homoj de Venezŭelo. Kaj se oni ne konsentas, oni citu nomon de socialisma gvidanto, kiu mortis mizera, aŭ almenaŭ malriĉa. Ĉu leganto konas socialiston profesian, kiu finis pli malriĉa ol tima, kiam li komencis? Vunde estas e tio, ke por ke unu gajnu, aliaj egas perdi. Se ili donas la monon libere kontraŭ servo, oni povas plendi pri nenio, sed se oni perforte elprenas de vi, la afero ŝanĝas.

Jam temo estas pri tio, ke ni hispanoj perdu tiun stultan nocion pri la supereco morala de maldekstro, nur pro tio, ke ĝi malvenkis militon, kiun ĝi provokis ĉar ĝi kredis, ke ĝi facile venkos, tiel, ke je la fino ĝi povos malaperigi tiun duonon de Hispanio, kiu ĝenis al ĝi. Ni estu hispanoj antaŭ ol dekstruloj aŭ maldekstruloj. Kaj tiu, kiu ne

## Ĉu nobelpremiito?



Oni ĵus konis, ke Donald' Trump, Prezidento de Usono, estis nomumita por Nobel' Premio pro siaj atingoj pacaj, ĉar li sukcesis organizi pacon inter Izraelo kaj Unuiĝintaj Arabaj Respublikoj, kaj ankaŭ pro tio, ke li rehejmenportas la armeon de Usono el Afganujo kaj Irako, kaj tamen paco estas ade garantiata en tiuj regionoj. Bone por li kaj por la mondo.

Kulturo

# Estantismo estas ignoranteco, ksenofobio, rasismo kaj perfido

Mi komprenas kiel Estantismon tiu manio, kiun multaj el niaj samtempuloj havas juĝi historiajn eventojn de la vidpunkto de valutoj kaj pensmanieroj de la jarcento 21a. Tio estas, ke konkerintoj hispanaj estis bestaĉoj pro tio, ke ili ne scipovis la lingvojn de la aborigenoj amerikaj, aŭ pro tio, ke la Inkvizicio estis io simila al naziaj tribunaloj, kaj ili estis samgradaj genociduloj kaj fiuloj ĉar ili devintus resti hejme anstataŭ iri perversigi kaj murdi per bakteriologia milito kompatindajn amerikanidojn, kiuj loĝis tie pace.



Mi supozas, ke en la estonto la kadavroj de tiuj maniuloj ne moviĝos multe el siaj tomboj kiam estontuloj komparos ilin kun anoj de Ku Kluks Klan', ĉar ili plenigis per perforto kaj maljusteco la stratojn de duono de la mondo, escepte tiujn de landoj en kiuj oni jam scias, ke ili estus batitaj senkompate. Sed la plej malbono pri tiuj homoj estas la nescio kaj profunda ignoranteco pri historiaj faktoj de ili priparolitaj. Ili kredas, ke ĉar ili povas legi Vikipedion ili jam komprenas historion. Analizi fakton historian supozas kompreni ties epokon, kaj repensi tion, kio okazis sub la lumo de progreso kaj manieresto de la socio tiama. Tiu nuna tiam ne ekzistis, eĉ eble nunaj ignoranteco kaj senpenso jam havis paralelojn tiutempe, ne mencii nunajn nescion kaj stultecon.

Dekomence, ili devus preni siajn propajn kulpojn, ĉar ili akuzas la prafilojn de tio, kion siaj antaŭuloj faris. Pri tio ili similas al feŭdaj sinjoroj, kiuj faris same kiam, ili povis: kulpigi tutan familion pro

tiuj krimoj, kiuj nur unu familiano faris; sed kiam la Reĝo sciis pri tio, Li punis la feŭdulon pro lia troigo. Do, tiuj ajnuloj, kiuj pentras, bruligas kaj kripligas statuojn en Ameriko nune, vere riproĉas la konduton de siaj propraj antaŭuloj, ĉar tiuj de europanoj hodiaŭaj restis en Eŭropo. Tiuj huliganoj rasnigraj, kiuj estis manipulaciataj de la desegnistoj de la kampanjo *Black Lives Matter!* (nigraj vivoj gravas) eble venas el tiuj nigraj sklavoj, kiuj prenis en Nordmerikon nederlandanoj, angloj kaj portugaloj, kaj nur post la jarcento 18ª en centran kaj sudon de la kontinento. Sed ankaŭ ili povas deveni el la triboj malamikaj afrikaj, kiuj vendis venkitojn kaj ties familiojn al tiuj menciitaj eŭropanoj, kiuj riĉigis sin per prisklava negoco, kaj poste ili enmigris en Usonon same kiel blankuloj faris (kiuj, oni ne forgesu, ankaŭ iris kiel sklavoj dum epoko, kiam angloj ofertis al krimuloj la punon enmigri en Amerikon kiel alternativon al pendado pro krimoj tiom teruraj kiel bati nobelulo, aŭ esti ĝenanta irlandano. Ĉu ili vere povas aserti, ke ne ili devenas el tiuj ĵus menciitaj? Nu, vere estas, ke ili nek povas nek volas, ĉar pro sia nerezonado ili kredas, ke la murdoj, kiujn ili faris, kaj bruligo de posedoj kaj disrabadoj estas justigitaj de la maljusta morto de nur unu persono...

Ni parolu pri la kazo de tiuj hispanoj, kiuj iris en Ameikon, indianistoj (hispane *indianos*), ĉar ties kazo ege diversas al tiuj de genocidistoj francaj, anglaj kaj nederlandaj, kiuj ruinigis la Nordon. Tiuj hispanoj iris "fari la Amerikojn", kaj ili aŭ mortis per la intenco (pli ofte ol oni povas pensi) aŭ ili riĉiĝis. Sed ili restis tie, kaj sekve ties praidoj ne nun vivas en Hispanio, sed en Peruo, Venezelo, Meksikio kaj tiel plu ĝis 25 landoj, inkluzivante nunan Usonon, kies 75% da lando apartenis al Vicregno de Nova Hispanio kaj poste al Meksikio dum kelkaj jaroj, ĝis kiam ili ne povis malebligi, ke gringoj forrabis ĝin per maljusta milito, kiun ili ne sciis venki. Tio estas, iliaj praavoj mem estis tiuj perfortistoj, genocidistoj, disrabistoj, kaj, aldone, malvenkintoj.

Sed vere ĉio tio, escepte de malvenki militon kontraŭ Usono, estas mensogo. Kiel oni povas kompreni, ke Hispanio okupis la tutan landon de Okcidento, Mezo kaj Sudo de Usono per tiom malmulte da soldatoj kaj sen ununura milito kontraŭ indianoj? Ĉu tiuj fiparolantoj malunuigintoj, ke la gvidanto de apaĉoj nomigis Gerónimo? (pron. Ĥero-nimo). Ne ŝajnas indiana nomo, ne. La

kaciko parolis la hispanan kaj atestis paktojn kun Krono de Hispanio kaj la genocidaj militoj de gringoj kaj meksikoj. Sed mi neniam legis iun kulpi usonanojn aŭ meksikojn pri tio. Malamiko de tiuj supozitaj korektistoj de historio ŝajnas esti Hispanio, ne Usono. Eble ĉar tiuj ne lasis atestantojn, kaj tiuj, kiuj eskapis la genocidon estas enfermitaj en indianaj rezervujoj, kie ili ricevas salajron dumviva por fari nenion, eĉ ĝeni.

Ili senhonte asertas, ke ili necesis nek la lingvon nek la religion de hispanoj. Tiuj homoj, se ne mensogas ili, estas neniu: antaŭ la Hispana Konkero, Ameriko ne ekzistis. La tutan kontinenton okupis diversaj triboj tute ne rilatantaj unu la aliajn. Nur sur la teritorio de nuna Usono logis 500 nacioj, tio estas, homaj grupoj kun kutimoj, lingvoj kaj kulturoj diversaj, kaj ili militis unu kontraŭ la aliaj. Ĝis kiam hispanoj venis kaj provizis ilin per komuna lingvo, la hispna, kaj komuna religio, la Katolika. Ankaŭ lernigis ilin, ke la mondo ekzistas pli longe ol horizonto, kaj estas malbonaj aferoj por sano, kiel militi kaj manĝi la venkitojn malamikajn. Ne forgesu, tamen, ke la Hispana imperio ne estis la unua, kiu Ameriko konis, ĉar antaŭ ĝi naskiĝis kiel komunumo kaj ekzistis nur kiel kontinento geografia nemalkovrita, jam estis tie du imperioj, laŭ mia scio: Inkaa kaj Azteka. Ambaŭ ili praktikis homajn oferojn por pacigi dion Sunon. La Hispana Imperio decidis finigi tiujn du imperiojn, kaj doni al ties subuloj vivon multe pli decan kaj homindan, en egaleco pri rajtoj al tiuj de la ceteraj subuloj de Kastilio. Kial tiuj indiĝenoj freŝbakitaj hodiaŭaj ne mencias tiujn aferojn? Ĉu pro ignoranteco, ĉu —kio estas multe pli fia— pro malico?


Tiujn detalojn ĉu ignoras ĉu evitas nesciaj staturompistoj. Eble tiuj demagogoj, kiuj movas tiun amason da senkapa karno ja scias pri tio, sed ili havas la strategion por detrui la instituciojn, kiujn tiom da laboro kostis kosntrui laŭ miloj da jaroj por altrudi tiujn siajn, kiuj se ili estus pli valoraj ne bezonus perforton por ke ĉiuj adoptos ilin.

Resume, mi konsilas al tiuj perfortistoj, ke ili trankviliĝu iomete, ke ili studu, ke ili iĝos civitanoj kaj homoj profitemaj. Kaj post juneco sepensema venos, se ili bonŝancas, zorgema oldeco, kie ili rikoltos la tempestojn, kiujn ili semis per siaj agoj. Alia juneco enos, kiu volos esti pli rompiĝema ol ili, kaj eble malaperigos ilin el la mapo, ĉar se malsolidaraj estis ili, tiuj, kiuj venos poste estos eĉ pli malbonaj. Se ne haltas ili nun repensi kaj edukos siajn gefilojn pli bone ol ili estis edukataj, por ke sia idaro estos pli bona ol ili, kaj ne falos en la samajn erarojn ridindigajn kaj vundigajn.

Recenzo

# Ni amas la Minoran Maron

Lastan Aprilon la 5an oni publikigis tiun ĉi interesan verkon, bedaŭrinde nur en la hispana ankoraŭ, pri la plej granda krimo ekologia, kiun oni faraĉis en Murcia de kiam mi povas memori.




Kiam mi unue venis en Murcion, antaŭ 43 jaroj, mi trovis naturan mirindaĵon, Maniko de Minora Maro, tio estas, longa lango de tero, kiu ĉirkaŭis kvanton da mediteranea maro, formigante kvazaŭ lagon, kies profundo estas malgranda, tiel, ke oni povas sekure naĝi tie. La temperaturo estas agrabla, kaj infanoj povas ludi senprobleme.


Tamen, kompanioj ĵetis rubon, kiun ili ne plu necesas produkti siajn varojn, kaj iom post iom la Minoran Maron estis ruinigita. Nun politikistoj kulpigas unu la aliajn, sed neniu solvas la problemon. Ŝajnas, ke Eŭropo donis monon por ke tiun oni solvos, sed la registaro de Hispanio blokis ĝin nome de nekonfesindaj kialoj. Ĉu pro tio, ke la registaro aŭtonoma estas de alia politika partio, kaj politikistoj ade vundas la popolon nur pro siaj problemoj?

La libron oni povas aĉeti ĉe la librovendejo de Diego Marín, apud la murcia universitato, kaj ankaŭ mendeblas ĉe la ĵurnalo VegaMediaPress mem, pere de Vasapo aŭ telefono: 637680285/ 663897890, kontraŭ €12 plus sendokostoj. Se oni deziras scii pli pri la libro, oni legu la artikolojn http://vegamediapress.com/art/19291/un-analisis-de-220-paginas-en-el-libro-amamos-el-mar-menor kaj http://vegamediapress.com/art/19034/amamos-el-mar-menor-un-libro-sin-dudas

Sanigaj murdoj

# 3ª La krizo

Dum kelkaj tagoj mi dubis ĉu estu pli bone diri al Brendin', ĉu silenti. De unu flanko, diri vundos sin; sed de la alia flanko ŝi sentis sin pli kaj pli kulpa, ŝi nervoziĝis,kaj dum ŝi volas plezurigi min, ŝi fartis malbone, kaj tion mi tute ne ŝatis. Se mi farus nenion, nia rilato finus; kaj pro viro, kiu ne meritas ŝin. Ŝi sentis sin mallojale al viro, kiu laboras dek horojn tage. Mi scciis, ke li laboras nur sep, kaj la aliajn tri li estis en alia loko, eble laborante, eble ne. Tial antaŭ ŝi faros decidon, kiun ni du bedaŭros poste, mi volis diri al ŝi, sed ne tiom klare, ke ŝi malamos min por ĉiam.




—Brendin', mi invitas vin al kino.

—Ĉu? Kion vi decidis, ke ni vidos?

—***Sonĝoj de alloganto***, ĉu vi jam vidis gin?

—Ne. Tiun faris Woody Allen, ĉu ne?

—Mi kredas. Oni diras, ke estas amuza.

—Kie oni montras ĝin?

—Ĉe Rialto.

Ŝia vizaĝo ekombriĝis.

—Tio estas proksime de...

—Via edzo ankoraŭ finos pli malfrue. Li eliras je la oka, ĉu ne?

—Jes.

—Nu, la filmo komencas je kvarono antaŭ la sesa. Ni povas iri eĉ pli frue, por ke vi ne nervoziĝus. Aldone, kiam ni atingos tie, mi povas iri malantaŭ vi, tiel, ke ŝajnos, ke ni ne iras kune.

—Bone, konsentite. Sed tiu situacio nervozigas min iomete.

—Jes, mi komprenas. Sed pensu, ke ni amuziĝos multe. Vi ridos pro la raraĵoj de maljuna Woody. Ni solvos problemojn, sed dume ni amuziĝu iomete, karulino. Memoru: *Carpe Diem!*

—Jes, evidente: *Carpe diem*, kiel la latino diris, *Ĝuu ĉi tiun tagon, ĉar venos aliaj, en kiuj ĝui vi ne povos*.

Kaj ni iris en kinoteatron Rialton, kiu estas unu el la plej bonaj en la urbo. Du stratoj antaŭ atingi la konstruaĵon de la entrepreno de Tomas', mi postrestis progresive, kaj atingante la pordon de la fabriko de fontoplumoj, kie ŝia edzo laboras, ŝi marŝas dudek metrojn antaŭ mi. Je tiu momento la pordo malfermiĝis, kaj Tomas' eliras surstraten. Neniu el ni du kredas tion, kion ili vidas.

—Vi!

—Saluton. Kion vi faras ĉi tie?

—Mi iras en kinoteatron.

—Ĉu sola?

—Jes, fojfoje mi iras sole. Sed hodiaŭ vi povas veni kun mi..., nu, se vi ne laboras.

—Ne. Mi hodiaŭ eliris frue ĉar mi estas tre laca. Vi iru, kaj amuzigu. Poste mi rakomtas, veninte hejmen.

—Ho, venu kun mi. Ne gravas, se vi ekdormas.

—Ne, ĉar se mi ronkas vi estos malkomforta. Vere, vi iru, kaj poste ni revidos hejme. Unu el ni amuziĝo, almenaŭ. Mi fartos bone kun mia libro sur nia sofao.

Mi perdis eĉ ne unu solan vorton de tiu dialogo, ŝajnigante subitan intereson pri tio, kio estas en la vendfenestro de la grunda etaĝo de la domo, kie Tomas' laboras, vere vendejo pri fontoplumoj, kies katalogo estis malfermita antaŭ mia rigardo. Spegulitaj sur la glaso mi vidis geedzojn, tiel, ke mi povis kontempli la vizaĝon stuporan de la virino, kiu dubas ĉu akompani la edzon hejmen, ĉu ne. Finfine ŝi cedis.

—Konsentite, Tomas', ripozu —ŝi diris kisante lin mallonge. Ili du apartiĝis en malajn direktojn.

Je la alia flanko de la angulo, irante al kinoteatro, mi malrapidis tiel, ke ŝi atingos min.

—Kion vi opinias?

—Suspektema. Se vi volas, ni povas sekvi lin.

—Li rimarkos ĝin.

—Mi dubas, ĉu li memoras pri mi. Kaj se li memoras, mi akompanos lin tien, kien li iras. Vi sekvu min.

—Bonorde.

Sed Tomaso ne rimarkis. Mi iris post lin, kaj kiam li jam estis ĉe pordo mistera kaj jam premis la butonon de la pordilo aŭtomata, mi trovis lin.

—Diable, Tomas'! Kiom da tempo!

—Gervasjo! Jes, multe da tempo. Mi ĝojas vidi vin.

—Ĉu vi loĝas ĉi tie?

—Ho, ne. Mi venas vidi amikojn.

Sed la voĉo parolante tra la ilo ne estis vira:

—Jes?

—Bonan vesperon, mastrino, estas mi.

Post sekundo, ni aŭdis la pordon malfermiĝi.

—Ĉu via amiko?

—Lia edzino.

—Ĉu vi nomas ŝin mastrino?

—Mi estas respektema kun edzinoj de miaj amikoj —li respondis iomete nervoze. —Kaj ŝi estas dommastrino.

—Bone, Tomas', mi devas foriri. Ĝis poste. Mi esperas, ke mi baldaŭ revidos vin kaj ni povos klaĉi iomete.

—Kiam vi volos.

Kaj mi iris al Brendin'.

—Kion vi opinias?

—Mi ne scias kion kredi. Kiu respondis la ilon?

—Estis ina voĉo. Kaj li nomis ŝin *mastrino*.

—Ĉu *Mastrino*? Strange...

Ripozigi ŝin, mi konvinkis ŝin pri sekvi nian dekomencan planon, ĉar ŝi ne plu povos reiri hejmen, se ŝia edzo supozas ŝin en kino.

Sekve, mi iris antaŭen kaj kiam ŝi venis en la teatron, mi atendas ŝin kun la biletoj en mia mano. Nin amuzis multe la drolaĵoj de Woody, kiun Humphrey Bogart konsilis saĝe por altiri virinojn, kiujn li ŝatas, sen multe da sukceso por la konsilito.

Sed la venintan tagon mi legis la tutan ĵurnalon en tiu parko, kie ni kutimis renkonti, kiam ŝi iras aĉeti. Iomete ĝena, mi iris al ŝia hejmo, kaj kaŝita malantaŭ nova ĵurnalo sur la benko de mia bushaltejo preferata, mi atendis pacience, ĝis kiam vi ion, kion mi tute ne ŝatis: ŝi ĵus venis akvumi florpotojn, sed mi vidis ion nekutiman: ŝi havis violan okulon.

*Tomas', vi estas mortinta homo*, mi diris al mi mem.

Pro tio kaj ĉar mi ne plu vidis Brendinon dum kelkaj monatoj.

Psikologio

# La ses bazaj emocioj

ArANĉa Merino estas pskikogiistino, kiu helpas homojn pere de siaj prelegoj pri psikologiaj aferoj. Lastatempe mi vidis ŝian filmeton en Youtube [jutub'] pri la ses bazaj emocioj.

Tiuj bazaj emocioj, laŭ ŝi jenas: Timo, malgajeco, kolero, orgojlo, amo kaj ĝojo. Kune kun ĉiu emocio, ŝi priskribas ties celojn, stimulojn, funkciojn sentojn, koloron, troigo kaj maltroigo.



Estas interese koni pri si mem, kaj uzi tiujn emociojn, ĉar ni ĉiuj sentas ilin, sed ne devas lasi ilin regi nin mem.

Ekzemple, la **celo** de timo estas ebligi sekurecon kaj harmonion kun sia vivo. La **funkcio** estas difini limojn; stimulo, minaco; **senco**, tuŝo; **koloro**, viola; **troigo**, hontemo, paralizo; **maltroigo**, troriskemo, venkismo.

La Faraono

# Ĉapittro 66a

La 20-an de Paofi Memfiso havis aspekton kvazaŭ en festo. Ĉesis ĉiuj laboroj, eĉ la portistoj ne portis la ŝarĝojn. La tuta popolo disfluis sur la placoj kaj stratoj aŭ amasiĝis ĉirkaŭ la temploj, precipe ĉirkaŭ tiu de Ptah, kiu estis plej bone fortigita, kaj kie kunvenis la pastraj kaj civilaj altranguloj, prezidataj de Herhor kaj Mefres.

Proksime de la temploj staris la regimentoj, en maldensaj vicoj, por ke la soldatoj povu komunikiĝi kun la popolo.

Inter la popolaĉo kaj soldatoj rondiris multenombraj vendistoj kun pano en korboj kaj kun vino en kruĉoj kaj ledaj sakoj. Ili regalis la popolon senpage. Kiam oni demandis ilin, kial ili ne postulas pagon, unuj respondis, ke lia sankteco regalas siajn regnanojn, aliaj diris:

– Manĝu kaj trinku, fidelaj egiptanoj, ĉar oni ne scias, ĉu ni ĝisvivos la morgaŭon..!

Tio estis la vendistoj de la pastra partio.

Rondiris multe da agentoj provokantoj. Unuj rakontis al la aŭskultantoj, ke la pastroj ribelas kontraŭ la monarĥo kaj eĉ volas lin veneni, ĉar li promesis al la popolo la sepan tagon de l' ripozo. Aliaj murmuretis, ke la Faraono freneziĝis kaj kunĵuris kun eksterlanduloj por pereigi la templojn kaj Egipton. Tiuj instigis la popolon ataki la templojn, kie la nomarĥoj diskutas kun la pastroj, kiel ekspluati la metiistojn kaj kamparanojn. Ĉi tiuj esprimis timon, ke se oni atakus la templojn, povus okazi granda malfeliĉo...

Malgraŭ tio, oni ne scias de kie apud la muroj de l' templo de Ptah troviĝis kelke da potencaj palisoj kaj amasoj de ŝtonoj.

La gravaj memfisaj komercistoj, promenante en la popolamasoj, tute ne dubis, ke la popola eksplodo estis provokita arte. La malgrandaj skribistoj, policistoj, oficiroj de la laboristoj kaj alivestitaj soldataj dekestroj ne kaŝis plu siajn oficialajn okupojn, nek sian intencon puŝi la popolon al la okupo de l' temploj. Aliflanke: la paraŝitoj, almozuloj, templaj servistoj kaj malsuperaj pastroj, eĉ se ili dezirus, ne povus kaŝi, ke ili ankaŭ instigas la popolaĉon al la superforto! Ĉiu, kiu havis okulojn, povis tion rimarki.

La prudentaj urbanoj estis

mirigitaj per tia konduto de l' pastra partio, kaj la hieraŭa fervoro de la popolo komencis estingiĝi. La aŭtoĥtonaj Egiptanoj ne povis kompreni: kia estas la celo kaj kiu efektive provokas la ribelon? La ĥaoso pligrandiĝis dank' al duone frenezaj fanatikuloj, kiuj kuris nudaj tra la stratoj kaj sange vundante sian korpon kriis:

—Ve al Egipto..! La sendieco trapasis la mezuron, kaj proksimiĝas la horo de l' juĝo! La dioj montros sian forton kontraŭ la malpieco de la malfideluloj!

La armeo restis trankvila, atendante ĝis kiam la popolo komencos superforte penetri en la templojn. Unuflanke, tian ordonon ili ricevis de la reĝa palaco; duaflanke, la oficiroj antaŭvidis embuskojn en la temploj kaj preferis, ke pereu la popolaĉo, ol la soldatoj. La soldatoj, sen tio, havos sufiĉe da laboro.

Sed la popolamasoj, malgraŭ la krioj de l' agitantoj kaj la vino senpage disdonata, ŝanceliĝis: la kamparanoj rigardis la metiistojn, la metiistoj la kamparanojn, kaj ĉiuj atendis ion.

Subite, ĉirkaŭ la unua horo tagmeze, el la flankaj stratoj ekfluis al la templo de Ptah ebria bando, armita per hakiloj kaj bastonegoj. Tio estis fiŝistoj, grekaj maristoj, paŝtistoj, libiaj vaguloj, eĉ malliberuloj de la minejoj de Turra. En la fronto de la bando iris grandega laboristo kun torĉo. Li haltis antaŭ la pordego de l' templo kaj per potenca voĉo komencis krii al la popolo:

—Ĉu vi scias, fideluloj, pri kio diskutas ĉi tie la ĉefpastroj kaj nomarĥoj..? Jen, ili volas devigi lian sanktecon, ke li forprenu de la laboristoj po unu hordea plata kuko tage, kaj la kamparanojn ŝarĝu per nova imposto, ĉiun po unu draĥmo... Kaj tial mi diras al vi, ke vi estas malsaĝaj kaj malnoblaj, starante ĉi tie kun krucitaj brakoj..! Oni devas fine kapti la rajtojn de l' temploj kaj transdoni ilin en la manojn de nia sinjoro, la Faraono, kontraŭ kiu komplotas la malpiuloj! Ĉar se nia estro devus cedi al la pastra kolegio, kiu defendos la honestan popolon..?

—Li diras la veron..! —oni kriis en la amaso.

—La sinjoro ordonos doni al ni la ripozon de la sepa tago.

—Kaj donacos al ni terojn...

—Li ĉiam estas bonvola por la simpluloj..! Ĉu vi memoras, kiel antaŭ du jaroj li liberigis la

kamparanojn, arestitajn post la atako kontraŭ la bieno de l' Hebreino?

—Mi mem vidis, kiel antaŭ du jaroj li batis skribiston, kiu kolektis de la kamparanoj maljustan imposton.

—Vivu eterne nia sinjoro, Ramzes XIII, la protektanto de la premataj..!

—Rigardu —eksonis voĉo de malproksime —la brutaro mem revenas de la paŝtejoj, kvazaŭ proksimiĝus la vespero...

—Lasu la brutojn... Antaŭen kontraŭ la pastroj..!

—Vi tie! —ekkriis la grandegulo antaŭ la pordego. —Propravole malfermu al ni, por ke ni konvinkiĝu, pri kio diskutas la ĉefpastroj kun la nomarĥoj...

—Malfermu..! alie ni rompos la pordegon..!

—Stranga afero —oni parolis de malproksime —la birdoj kuŝiĝas por dormi... Estas ja nur la tagmezo...

—Io malbona fariĝas en la aero...

—Dioj! la nokto jam falas, kaj mi ne kolektis ankoraŭ salaton por la tagmanĝo... —miris iu knabino.

Sed ĉi tiujn rimarkojn sufokis la krioj de la ebria bando kaj la bruo de la palisoj, batantaj la kupran pordegon de l' templo.

Se la popolamaso estus malpli okupita per la agoj de l' atakantoj, ĝi jam rimarkus en la naturo ian eksterordinaran fenomenon. La suno lumis, sur la ĉielo estis neniu nubeto, kaj malgraŭ tio la taga lumo komencis malgrandiĝi kaj blovis malvarmeta vento.

—Donu ĉi tien ankaraŭ unu palison..! —kriis la atakantoj. —La pordo cedas..!

—Forte..! ankoraŭ unu fojon..!

La rigardanta amaso bruis, kiel fulmotondro... Tie ĉi kaj tie komencis foriĝi de ĝi malgrandaj grupoj kaj kuniĝi kun la atakantoj. Fine la tuta popola amaso malrapide proksimiĝis al la templo.

Kvankam estis tagmezo, la krepusko pligrandiĝis; en la templo de Ptah komencis kanti la kokoj. Sed la furiozo de la popolo estis jam tiel granda, ke malmultaj rimarkis la ŝanĝojn.

—Rigardu! —kriis almozulo —jen proksimiĝas la tago de juĝo... Dioj...

Li volis daŭrigi, sed ekbatita per bastono je la kapo, falis sur la loko.

Sur la murojn de l' templo komencis grimpi homoj nudaj, sed armitaj. La oficiroj alvokis la soldatojn al la armiloj, certaj, ke baldaŭ oni devos subteni la

atakon de la popolaĉo.

—Kion tio signifas... —murmuretis la soldatoj, rigardante la ĉielon.

—Oni ne vidas nubojn, tamen la mondo havas aspekton kvazaŭ dum la ventego..?

—Batu..! rompu... —oni kriis antaŭ la templo.

La bruo de la palisoj sonis pli kaj pli ofte.

En ĉi tiu momento sur la teraso super la pordego aperis Herhor, ĉirkaŭita de sekvantaro de pastroj kaj civilaj altranguloj. La plej nobla ĉefpastro havis oran diservan veston kaj la ĉapon de Amenhotep, ĉirkaŭitan de la reĝa ureuso.

Herhor ekrigardis la grandegan popolamason, kiu sieĝis la templon kaj sin klininte al la atakanta bando, diris:

—Kiuj ajn vi estas, fideluloj aŭ idolanoj, en la nomo de l' dioj mi alvokas vin lasi la templon trankvila...

La tumulto eksilentis kaj oni aŭdis nur la batadon de la palisoj kontraŭ la kupra pordego. Sed baldaŭ ankaŭ tio ĉesis.

—Malfermu la pordegon! —kriis de malsupre la grandegulo. —Ni volas konvinkiĝi, ĉu vi ne konspiras perfidon kontraŭ nia sinjoro...

—Mia filo —respondis Herhor —falu sur la vizaĝon kaj petegu la diojn, ke ili pardonu al vi la sakrilegon...

—Vi mem petu la diojn, ke ili ŝirmu vin..! —ekkriis la ĉefo de la bando kaj preninte ŝtonon, ĵetis ĝin supren al la ĉefpastro.

En la sama momento, el la fenestro de la pilono falis sur la vizaĝon de l' grandegulo io, kvazaŭ maldika akva strio. La bandito ekŝanceliĝis, baraktis per la manoj kaj falis.

Liaj plej proksimaj najbaroj eligis krion de teruro; la pli malproksimaj vicoj, ne sciante, kio okazis, respondis per ridoj kaj malbenoj.

—Rompu la muron..! —oni kriis de malproksime, kaj ŝtonoj, kvazaŭ hajlo flugis al Herhor kaj lia sekvantaro.

Herhor levis ambaŭ manojn al la ĉielo. Kaj kiam la amasoj ree eksilentis, la ĉefpastro ekkriis per forta voĉo:

—Dioj, sub vian protekton mi transdonas la sanktejojn, kiujn minacas perfidaj blasfemuloj...

Post unu momento, ie super la templo, eksonis superhoma voĉo:

—Mi deturnas mian vizaĝon de la malbenita popolo kaj mallumo falu sur la teron.

Kaj okazis afero terura: kun la malbenaj vortoj, la suno estis perdanta sian brilon..! Kaj post la lasta vorto fariĝis mallume, kiel nokte.

Sur la ĉielo ekbrilis la steloj, kaj la lokon de l' suno okupis nigra disko, ĉirkaŭita per ringo de flamoj.

Terura krio elŝiriĝis el cent mil brustoj. La atakantoj, rompantaj la pordegon, ĵetis la palisojn, la kamparanoj falis teren...

—Jen venis la tago de l' juĝo kaj morto..! —ekkriis ĝema voĉo, de fino de l' strato.

—Dioj, kompaton..! Sankta viro, deturnu la katastrofon..! —kriis la popolo.

—Ve al la soldatoj, kiuj plenumas la ordonojn de sendiaj ĉefoj..! —kriis la potenca voĉo de la templo.

Responde la tuta popolo falis sur la vizaĝon, kaj en du regimentoj antaŭ la templo ekregis malordo. La vicoj rompiĝis, la soldatoj komencis ĵeti la armilojn kaj kiel frenezaj forkuri al la rivero. Unuj, kurante kiel blindaj, en la mallumo sin frakasis je la muroj de l' domoj; aliaj falis sur la pavimon, kaj iliaj kunuloj morte piedpremis ilin. Post kelke da minutoj, anstataŭ densaj kolonoj, kuŝis sur la placo disĵetitaj lancoj kaj hakiloj, kaj ĉe la eniro en la stratojn -- altaj amasoj da vunditoj kaj kadavroj.

Neniu perdita batalo finiĝis per tia katastrofo.

—Dioj..! dioj..! —ĝemis kaj ploris la popolo —ekkompatu la senkulpajn...

—Oziriso..! —ekkriis de la teraso Herhor —ekkompatu la popolon kaj montru vian vizaĝon al la malfeliĉuloj...

—Lastfoje mi plenumos la petojn de miaj pastroj, ĉar mi estas kompatema... —respondis la superhoma voĉo de la templo.

En la sama momento la mallumo forkuris, kaj la suno reakiris sian brilon.

Nova krio, nova ploro, novaj preĝoj eksonis en la popolamasoj. Ebriaj de l' ĝojo la homoj salutis la revivigantan sunon. Nekonatoj sin ĵetis en la brakoj unuj de aliaj, kelke da personoj mortis, kaj ĉiuj surgenue rampis al la templo, por kisi ĝiajn sanktajn murojn.

Sur la supro de la pordego staris la plej nobla Herhor. Lia rigardo dronis en la ĉielo, kaj du pastroj subtenis liajn sanktajn manojn, per kiuj li dispelis la mallumon kaj savis sian popolon de l' pereo.

Samaj scenoj, kun malgrandaj ŝanĝoj, okazis en la tuta Malsupra Egipto. En ĉiu urbo, la 20-an de Paofi, la popolo kolektiĝis antaŭ la

temploj; en ĉiu urbo ĉirkaŭ la tagmezo iu bando atakis la sanktan pordegon. Ĉie, ĉirkaŭ la unua horo, super la pordego aperis la ĉefpastro de l' templo kun sekvantaro, malbenis la malpiulojn kaj faris mallumon. Kaj kiam la popolo forkuris en paniko aŭ falis teren, la ĉefpastroj preĝis al Oziriso, ke li montru sian vizaĝon, kaj la taga lumo revenis sur la teron.

Tiamaniere, dank' al la mallumiĝo de la suno, la plena de saĝo pastra partio ekŝancelis la aŭtoritaton de l' Faraono eĉ en Malsupra Egipto.

En la daŭro de kelke da minutoj la registaro de l' Faraono troviĝis, eĉ ne sciante pri tio, ĉe la bordo de l' senfundaĵo. Savi ĝin povis nur granda inteligento kaj detala kompreno de l' situacio. Sed tio jam mankis en la reĝa palaco, kie ĝuste en la malfacila momemto komencis ĉiopova regado de l' okazo.

La 20-an de Paofi lia sankteco leviĝis kun la suno kaj, por esti pli proksime de la teatro de l' agado, li transloĝiĝis el la ĉefa palaco en somerdomon, apenaŭ unu horon de piedira vojo de Memfiso. La domo havis ĉe unu flanko la kazernojn de la aziaj regimentoj, ĉe la alia la palacon de Tutmozis kaj de lia edzino, la bela Hebron. Kun la sinjoro venis tien la fidelaj partianoj de Ramzes kaj la unua regimento de l' gvardio, al kiu la Faraono konfidis senlime.

Ramzes XIII havis bonegan humoron. Li banis sin, matenmanĝis kun apetito kaj komencis akcepti la kurierojn, kiuj ĉiun kvaronhoron venis de Memfiso.

Iliaj raportoj estis tede unutonaj. La ĉefpastroj kaj kelke da nomarĥoj sin enfermis en la templo de Ptah. La armeo estas plena de kuraĝo, la popolo ekscitita. Ĉiuj benas la Faraonon kaj atendas la ordonon al la atako.

Kiam je la 9-a horo kvara kuriero ripetis la samajn vortojn, la Faraono sulkigis la brovojn.

—Kion ili atendas..? —demandis la sinjoro. —Ili ataku senprokraste.

La kuriero respondis, ke ne kolektiĝis ankoraŭ la ĉefa bando, kiu devas ataki la templon kaj rompi la kupran pordegon.

Ĉi tiu klarigo ne plaĉis al la sinjoro. Li skuis la kapon kaj sendis oficiron, por plirapidigi la atakon.

—Kion signifas ĉi tiu prokrasto..? —demandis li. —Mi pensis, ke miaj regimentoj vekos min per la sciigo, ke la templo estas prenita...

En similaj okazoj la rapideco de l' agado estas la ĉefa kondiĉo de l' sukceso.

La oficiro forveturis, sed apud la templo de Ptah nenio ŝanĝiĝis. La popolo atendis ion, la ĉefa bando ne venis ankoraŭ.

Oni povis supozi, ke iu alia volo malfruigas la plenumon de la ordonoj.

Je la deka horo matene al la somerdomo de l' faraano venis la portilo de la reĝino Nikotris. La respektinda sinjorino preskaŭ superforte penetris en la ĉambron de l' filo kaj kun ploro falis al liaj piedoj.

—Kion vi postulas, patrino? —diris Ramzes, apenaŭ kaŝante la malpaciencon. —Ĉu vi forgesis, ke en la tendaro ne estas loko por la virinoj..?

—Hodiaŭ mi ne moviĝos de ĉi tie, mi ne forlasos vin eĉ dum unu momento..! —ekkriis ŝi. —Estas vere, ke vi estas la filo de Izido kaj ke ŝi ĉirkaŭas vin per sia protekto... Sed malgraŭ tio mi mortus de maltrankvilo...

—Kio minacas min? —demandis la Faraono, levante la ŝultrojn.

—La pastro, kiu observas la stelojn —daŭrigis la reĝino kun ploro —diris al unu el la servistinoj, ke se hodiaŭ... se la hodiaŭa tago pasos feliĉe por vi, vi vivos kaj regos cent jarojn...

—Ah, ah..! kie estas tiu konanto de mia sorto?

—Li forkuris Memfison... —respondis la reĝino.

La Faraono ekmeditis, poste li diris ridante:

—Kiel Libianoj apud Sodaj Lagoj ĵetis sur nin ŝtonojn, tiel hodiaŭ la pastraro sendas al ni minacojn... Estu trankvila, patrino! La babilado estas malpli danĝera, ol la sagoj kaj ŝtonoj.

De Memfiso venis nova kuriero, ke ĉio iras bone, sed ke la ĉefa bando ne estas ankoraŭ preta.

Sur la bela vizaĝo de l' Faraono aperis signoj de la kolero. Dezirante trankviligi la monarĥon, Tutmozis diris:

—La popolaĉo ne estas armeo. Ĝi ne scias kolektiĝi al destinita horo; irante ĝi treniĝas kiel koto kaj ne obeas la komandon. Se al la regimentoj oni estus ordoninta okupi la templojn, ili jam estus tie...

—Kion vi diras, Tutmozis..? —ekkriis la reĝino. —Ĉu oni iam aŭdis, ke la egipta armeo...

—Vi forgesis —interrompis la Faraono —ke laŭ miaj ordonoj, la regimentoj ne devas ataki, sed defendi la templojn kontraŭ la atako de l' popolaĉo...

—Kaj tial malfruas nia agado —respondis malpacience Tutmozis.

—Jen la reĝaj konsilantoj! —eksplodis la reĝino. —La sinjoro agas prudente, stariĝante kiel defendanto de l' dioj, kaj vi, anstataŭ kvietigi lin, instigas al la superforto...

La sango leviĝis al la kapo de Tutmozis. Feliĉe, elvokis lin el la ĉambro adjutanto, sciigante, ke ĉe la pordego oni haltigis maljunulon, kiu volas paroli kun lia sankteco.

—Ĉe ni hodiaŭ —murmuris la adjutanto —ĉiu sin puŝas al la sinjoro, kvazaŭ la Faraono estus gastejmastro...

Tutmozis pensis, ke tamen en la tempo de Ramzes XII neniu kuraĝus tiel paroli pri la monarĥo... Sed li ŝajnigis, ke li ne atentas.

La maljunulo, kiun haltigis la gardistoj, estis la fenicia princo Hiram. Li portis kovritan de polvo soldatan mantelon, estis laca kaj kolera.

Tutmozis ordonis enlasi lin, kaj kiam ambaŭ troviĝis en la ĝardeno, li diris:

—Mi pensas, ke via nobleco sin banos kaj ŝanĝos la vestojn, antaŭ kiam mi ricevos por vi aŭdiencon de lia sankteco?

La grizaj brovoj de Hiram stariĝis, liaj okuloj fariĝis ankoraŭ pli sangaj.

—Post tio, kion mi vidis —respondis li akre —mi povas eĉ ne postuli aŭdiencon...

—Vi ja havas la leterojn de l' ĉefpastroj al Asirio...

—Por kio vi bezonas la leterojn, se vi repaciĝis kun la pastroj..?

—Kion babilas via nobleco..? —eksplodis Tutmozis.

—Mi scias, kion mi parolas..! —diris Hiram. - Dekojn da miloj da talentoj vi eltiris de Fenicio, por liberigi, vi diris, Egipton de la pastra povo, kaj rekompence hodiaŭ vi rabas nin kaj mortigas... Rigardu, kio okazas, de la maro ĝis la unua katarakto: ĉie via popolaĉo persekutas Fenicianojn, kiel hundoj, ĉar tia estas la ordono de l' pastroj...

—Vi freneziĝis, Feniciano..! —En ĉi tiu momento nia popolo prenas la templon de Ptah en Memfiso...

Hiram eksvingis la manon.

—Ili ne prenos ĝin! —respondis li. —Vi trompas min, aŭ vi mem estas trompitaj... Vi devis antaŭ ĉio preni Labirinton kaj ĝian trezorejon, kaj ne pli frue, ol la 23-an de Paofi... Dume hodiaŭ vi malŝparas la fortojn apud la templo de Ptah, kaj Labirinto estas perdita... Kio okazas ĉi tie..? Kie estas la prudento..? —daŭrigis la ekscitita Feniciano.

—Por kio la atakoj kontraŭ malplenaj konstruaĵoj..? Ĉu vi atakas ilin, por ke oni pligrandigu la gardistaron de Labirinto!

—Ni prenos ankaŭ Labirinton. —interrompis Tutmozis.

—Nenion vi prenos, nenion..! Labirinton povis okupi nur unu homo, al kiu malhelpos viaj hodiaŭaj aventuroj en Memfiso.

Tutmozis haltis en la aleo.

—Kion vi aludas..? —mallonge demandis li Hiramon.

—La malordon, kiu regas ĉe vi... Vi ne estas plu registaro, sed amaso de oficiroj kaj altranguloj, kiun la pastroj pelas, kien ili volas kaj kiam ili volas... De tri tagoj en la tuta Malsupra Egipto regas tia ĥaoso, ke la popolaĉo batas nin, Fenicianojn, viajn solajn amikojn... Kaj kial..? Ĉar la povo elglitis el viaj manoj kaj jam kaptis ĝin la pastroj...

—Vi parolas tiel, ĉar vi ne konas la situacion —respondis Tutmozis. —Vere estas, ke la pastroj implikas niajn aferojn kaj atakas Fenicianojn. Sed la povo estas en la manoj de l' Faraono, la ĝenerala fluo de l' okazoj fariĝas laŭ liaj ordonoj...

—Ankaŭ la hodiaŭa atako kontraŭ la templo de Ptah? —demandis Hiram.

—Jes. Mi mem ĉeestis privatan kunvenon, dum kiu la Faraono ordonis okupi la templojn hodiaŭ, anstataŭ la 23-an...

—Do —interrompis Hiram —mi anoncas al vi, ĉefo de la gvardio, ke vi estas perditaj... Ĉar mi scias tute certe, ke la hodiaŭa atako estis decidita en la kunveno de l' ĉefpastroj kaj nomarĥoj, la 13-an de Paofi en la templo de Ptah.

—Por kio ili decidus la atakon kontraŭ si mem..? —demandis Tutmozis per moka tono.

—Sendube tion iel postulas iliaj aferoj. Kaj ke ili kondukas siajn aferojn pli bone ol vi, pri tio mi jam konvinkiĝis.

La interparoladon interrompis adjutanto, alvokanta Tutmozison al lia sankteco.

—Aŭskultu ankoraŭ..! —diris Hiram. —Viaj soldatoj arestis sur la vojo Pentueron, kiu havas ion gravan por diri al la Faraono.

Tutmozis sin kaptis je la kapo kaj tuj sendis oficirojn, por ke ili trovu Pentueron. Poste li kuris al la Faraono, kaj post momento revenis, kaj ordonis al la Feniciano sekvi lin.

Kiam Hiram eniris en la reĝan ĉambron, li trovis tie la reĝinon, grandan trezoriston, grandan skribiston kaj kelke da generaloj.

Ramzes XIII, incitita, rapide paŝis en la salono.

—Jen estas la malfeliĉo de l' Faraono kaj Egipto! —ekkriis la reĝino, montrante la Fenicianon.

—Respektinda sinjorino —respondis la nekonfuzita Hiram kun saluto —la tempo montros, kiu estas fidela, kaj kiu malbona servisto de lia sankteco...

Ramzes subite haltis antaŭ Hiram.

—Ĉu vi havas la leterojn de Herhor al Asirio..? —demandis li.

La Feniciano eltiris el sub la vesto paketon kaj silente transdonis ĝin al la Faraono.

—Nur tion mi bezonis! —ekkriis kun triumfo la estro. Oni devas tuj anonci al la popolo, ke la ĉefpastroj perfidis la ŝtaton...

—Mia filo —interrompis la reĝino per peteganta voĉo —pro la ombro de l' patro... pro niaj dioj, prokrastu kelke da tagoj la anoncon... Kun la donacoj de Feniciano oni devas esti tre singarda...

—Via sankteco —intermetis Hiram —povas eĉ bruligi la leterojn.

—Ili estas indiferentaj por mi.

La Faraono pensis momenton kaj kaŝis la paketon sub la tuniko.

—Kion vi aŭdis en Malsupra Egipto? —demandis la sinjoro.

—Ĉie oni batas Fenicianojn —respondis Hiram. —Niaj domoj estas detruataj, mebloj ŝtelataj kaj jam oni mortigis kelkdekon da homoj.

—Mi aŭdis pri tio..! Tio estas la verko de l' pastroj —diris la sinjoro.

—Prefere diru, mia filo, ke tio estas la sekvoj de la sendieco kaj rabemo de Fenicianoj —intermetis la reĝino.

Hiram sin deturnis de l' reĝino kaj daŭrigis:

—De tri tagoj estas en Memfiso la policestro de Pi-Bast, kun du helpantoj kaj ili jam estas sur la postesignoj de Likon...

—Kiu estis edukita en la feniciaj temploj! —ekkriis la reĝino Nikotris.

—... De Likon —daŭrigis Hiram —kiun la ĉefpastro Mefres ŝtelis de la polico kaj tribunalo... De Likon, kiu en Teboj, ŝajnigante vian sanktecon, kuradis nuda en la ĝardeno, kiel frenezulo...

—Kion vi diras..? —ekkriis la Faraono.

—Via sankteco demandu la plej respektindan reĝinon, ĉar ŝi vidis lin... —respondis Hiram.

—Jes —diris la reĝino —mi vidis

tiun malnoblulon, sed mi diris nenion, por ŝpari al vi ĉagrenon... Sed mi devas aldoni, ke neniu havas pruvojn, ke Likon estis instigita de l' pastroj; la samon povis fari Fenicianoj...

Hiram ekridetis ironie.

—Patrino... patrino..! —diris dolore Ramzes —ĉu en via koro la pastroj valoras pli multe ol mi..?

—Vi estas mia filo kaj mia plej kara sinjoro —respondis la reĝino kun ekscito —sed mi ne povas toleri, ke fremdulo... idolano... ĵetas kalumniojn sur la sanktan pastraron, de kie ni ambaŭ devenas... Ho Ramzes..! —ekkriis ŝi, falante sur la genuojn —forpelu la malbonajn konsilantojn, kiuj vin puŝas al la sakrilego de l' temploj, al atenco kontraŭ la posteulo de via avo Amenhotep! Estas ankoraŭ tempo... estas ankoraŭ tempo por paco... por savi Egipton...

Subite eniris en la ĉambron Pentuer en disŝiritaj vestoj.

—Kion vi diros? —demandis la Faraono kun stranga trankvilo.

—Hodiaŭ, eble tuj —respondis la pastro —estos mallumiĝo de la suno...

La Faraono posteniĝis de miro.

—Kio estas por ni la mallumiĝo de l' suno, precipe en la nuna momento?

—Sinjoro —diris Pentuer —mi ankaŭ pensis tiel, ankaŭ kiam mi legis en la malnovaj kronikoj priskribojn de l' mallumiĝoj... Tio estas tiel terura fenomeno, ke oni devus averti la tutan popolon...

—Jen..! —intermetis Hiram.

—Kial vi ne sciigis al ni pli frue? —demandis la pastron Tutmozis.

—Du tagojn la soldatoj tenis min arestita... La popolon ni ne povos plu averti, sed sciigu almenaŭ al la regimentoj apud la palaco, por ke almenaŭ ili kontraŭstaru al la paniko.

—Ah, malbone, malbone..! —murmuretis Ramzes kaj aldonis laŭte: —Kio ĝi estos kaj kiam..?

—Tage fariĝos nokto... —diris la pastro. —Ĝi devas daŭri, oni diras, tiom da tempo, kiom oni bezonas por iri kvincent paŝojn... Ĝi komenciĝos tagmeze... Tiel diris al mi Menes...

—Menes? —ripetis la Faraono. —Mi konas la nomon, sed...

—Li skribis pri tio leteron al via sankteco... Sed avertu la regimentojn..!

Tuj eksonis la trumpetoj. La gvardio kaj Asirianoj stariĝis kun

la armiloj, kaj la Faraono, ĉirkaŭita de l' stabo, sciigis pri la mallumiĝo, aldonante, ke ili ne devas timi, ĉar la mallumo tuj pasos, kaj li estos kun ili.

—Vivu eterne! —respondis la armitaj vicoj.

Samtempe Memfison oni sendis kelke da plej inteligentaj kavaliroj.

La generaloj sin lokis en la fronto de l' kolonoj, la Faraono medite promenis sur la korto, la civilaj altranguloj mallaŭte murmuretis kun Hiram, kaj la reĝino Nikotris, kiu restis sola en la ĉambro, falis sur la vizaĝon antaŭ la statuo de Oziriso.

Estis jam post la unua horo, kaj efektive la lumo de la suno komencis malgrandiĝi.

—Ĉu vere estos nokto? —demandis la Faraono Pentueron.

—Jes, sed tre mallongan tempon.

—Kaj la suno?

—Ĝi kaŝos sin post la luno...

—Mi devas redoni mian favoron al la saĝuloj, kiuj esploras la stelojn... —diris la sinjoro al si mem.

La krepusko rapide pligrandiĝis. La ĉevaloj de l' Azianoj komencis maltrankviliĝi, aroj da birdoj falis sur la ĝardenon kaj kun laŭta pepado okupis ĉiujn arbojn.

—Kantu ion..! —ekkriis Kalipos al la Grekoj.

Ekbruis la tamburoj, ekfajfis la flutoj kaj kun lia akompano la greka regimento kantis la gajan kanton pri la timema filino de l' pastro: ŝi tiel timis la fantomojn, ke ŝi povis dormi nur en la kazernoj.

Subite sur la flavajn libiajn altaĵojn falis malbonsigna ombro kaj kun fulma rapideco kovris Memfison, Nilon kaj la palacajn ĝardenojn. La nokto invadis la teron, kaj sur la ĉielo aperis disko, nigra kiel karbo, kaj ĉirkaŭita per krono de flamoj.

Terura ekkrio mutigis la kanton de la greka regimento: la Azianoj ĵetis militan krion, sendante al la ĉielo nubon de sagoj, por fortimigi la malbonan spiriton, kiu volas manĝi la sunon.

—Vi diras, ke la nigra disko estas la suno? —demandis la Faraono Pentueron.

—Tiel asertas Menes...

—Granda saĝulo li estas..! kaj la mallumiĝo tuj finiĝos..?

—Tute certe...

—Kaj se la luno deŝiriĝus de la ĉielo kaj falus sur la teron..?

—Tio ne estas ebla... Jen la suno..! —ekkriis Pentuer kun ĝojo.

Ĉiuj regimentoj kriis grandan aklamon por la honoro de Ramzes XIII.

La Faraono ĉirkaŭprenis Pen-

tueron.

—Vere —diris la sinjoro —ni vidis strangan fenomenon... Sed mi ne volus vidi ĝin duan fojon... Mi sentas, ke se mi ne estus soldato, la timo ekregus mian koron.

Hiram proksimiĝis al la Faraono kaj murmuretis:

—Sendu via ekscelenco kurieron Memfison, ĉar mi timas, ke la ĉefpastroj faris al vi ion malbonan...

—Vi supozas?

Hiram balancis la kapon.

—Ili ne regus tiel longe la ŝtaton —diris li —ne enterigus ok dek viajn dinastiojn, se ili ne scius profiti tiajn okazojn, kiel la hodiaŭa..!

Dankinte la armeon por ilia bona sintenado dum la eksterordinara fenomeno, la Faraono revenis en la somerdomon. Li estis meditplena, parolis trankvile, eĉ delikate, sed sur lia bela vizaĝo estis legebla necerteco.

Efektive en la animo de Ramzes bolis terura batalo. Li komencis kompreni, ke la pastroj havas en la manoj fortojn, kiujn ne nur li ne atentis, sed eĉ pri kiuj li ne pensis, pri kiuj li ne volis aŭskulti.

La pastroj, observantaj la movojn de l' steloj, en la daŭro de kelke da minutoj ekstreme grandiĝis en liaj okuloj. Kaj la Faraono diris al si, ke tamen oni devas koni la strangan saĝon, kiu tiel terure implikas la homajn projektojn.

Kuriero post kuriero estis sendata Memfison, por ekscii, kio okazis tie dum la mallumiĝo. Sed la kurieroj ne revenis, kaj super la reĝo kaj liaj konfidatoj la necerteco disetendis siajn nigrajn flugilojn. Ke io malbona okazis apud la templo de Ptah, pri tio ne sole neniu dubis, sed eĉ ne kuraĝis aŭskulti la proprajn konjektojn. Ŝajnis, ke la Faraono kaj la liaj estas kontentaj de ĉiu minuto, kiu pasis sen novaĵo de tie.

Dume la reĝino Nikotris, sidiĝinte apud la sinjoro, murmuretis al li:

—Permesu al mi agi, Ramzes... La virinoj pli ol unu servon faris al nia ŝtato... Rememoru nur la reĝinon Nikotris dum la sesa dinastio, aŭ la reĝinon Makara, kiu kreis la ŝiparon sur Ruĝa maro..? Al nia sekso mankas nek saĝo, nek energio, permesu do al mi agi... Se la templo de Ptah ne estas prenita, nek la personoj de l' pastroj atakitaj, mi repacigos vin kun Herhor. Vi prenos kiel edzinon lian filinon, kaj via regado estos plena de gloro... Memoru, ke via avo, la sankta Amenhotep, ankaŭ estis ĉefpastro kaj vic-reĝo de l' Faraono, kaj ke vi mem eble ne regus hodiaŭ, se la pastraro ne dezirus havi la propran sangon sur la trono... Tiel vi dankas ilin pro la povo..?

La Faraono aŭskultis ŝin, sed senĉese pensis, ke tamen la saĝo de la pastroj estas grandega forto, kaj ke la batalo kontraŭ ili estas malfacila...

Nur je la tria horo aperis la unua kuriero de Memfiso, -- adjutanto de l' regimento, kiu havis sian tendaron apud la templo. Li diris al la Faraono, ke la templo ne estis prenita kaŭze de la kolero de l' dioj, ke la popolo forkuris, la pastroj triumfas, ke eĉ en la armeo ekregis malordo dum la terura, kvankam mallonga nokto.

Poste, preninte Tutmozison flanken, li anoncis, ke la soldatoj estas demoralizitaj, ke post la panika forkuro ili havas tiom da vunditoj kaj mortigitoj, kiel post batalo.

—Kaj kia estas nun la stato de la armeo..? —demandis la konsternita Tutmozis.

—Kompreneble —respondis la adjutanto —ni sukcesis kolekti kaj ordigi la soldatojn. Sed uzi ilin kontraŭ la temploj? pri tio oni ne povas eĉ pensi... precipe nun, kiam la pastroj sin okupas per la flegado de l' vunditoj... Nun la soldato, vidante razitan kapon kun pantera felo, estas preta fali sur la vizaĝon, kaj multe da akvo forfluos, antaŭ kiam iu kuraĝus transpasi la sanktan sojlon...

—Kaj la pastroj ..?

—Ili benas la soldatojn, nutras, donas al ili trinkaĵon kaj ŝajnigas, ke la armeo ne estis kulpa en la atako kontraŭ la temploj, ke tio estas la verko de Fenicianoj...

—Kaj vi permesas tian demoralizon de la regimentoj..? —ekkriis Tutmozis.

—Lia sankteco ja ordonis al ni defendi la pastrojn kontraŭ la popolaĉo... —respondis la adjutanto. —Se oni permesus al ni okupi la templojn, ni jam estus tie de la deka horo, kaj la ĉefpastroj estus en la keloj.

Deĵoranta oficiro sciigis al Tutmozis, ke ree iu pastro, veninta de Memfiso, deziras paroli kun lia sankteco.

Tutmozis atente rigardis la gaston. Tio estis homo ankoraŭ juna, kun vizaĝo kvazaŭ skulptita en ligno. Li diris, ke li venas al la Faraono, de Samentu.

Ramzes tuj akceptis la pastron, kiu falinte sur la plankon, donis al Ramzes ringon. La monarĥo paliĝis.

—Kion tio signifas..? —demandis la sinjoro.

—Samentu mortis... —respondis la sendito.

Ramzes dum unu momento ne povis eligi sonon el la gorĝo. Fine li diris:

—Kiel tio okazis..?

—Ŝajnas —diris la pastro —ke Samentu estis trovita en unu el la salonoj de Labirinto kaj ke li mem venenis sin, por eviti turmentojn... Ŝajnas ankaŭ, ke malkovris lin Mefres, kun helpo de iu Greko, kiu, oni diras, tre similas vian sanktecon...

—Ree Mefres kaj Likon! —ekkriis kolere Tutmozis. —Sinjoro —li turnis sin al la Faraono —ĉu neniam vi liberigos vin de ĉi tiuj perfiduloj..?

Lia sankteco ree kunvokis privatan kunsidon en sia ĉambro. Li alvokis Hiramon kaj la pastron, kiu venis kun la ringo de Samentu.

Pentuer ne volis partopreni, la respektinda reĝino Nikotris venis neinvitite.

—Mi vidas —murmuretis Hiram al Tutmozis —ke kiam la pastroj estos forpelitaj, la virinaĉoj komencos regi Egipton..!

Kiam kolektiĝis la altranguloj, la Faraono donis la parolon al la sendito de Samentu. La juna pastro volis nenion paroli pri Labirinto. Kontraŭe li vaste rakontis, ke la templo de Ptah tute ne estas defendata, kaj ke sufiĉus kelkdeko da soldatoj, por preni ĉiujn, kiuj sin kaŝas en ĝi.

—Ĉi tiu homo estas perfidulo..! —ekkriis la reĝino. —Li mem pastro, li konsilas al vi superforton kontraŭ la pastroj...

Eĉ unu muskolo ne ektremis en la vizaĝo de l' sendito.

—Respektinda sinjorino —respondis li —se Mefres pereigis mian protektanton kaj majstron, Samentu, mi estus hundo, se mi ne serĉus venĝon. Morto por morto..!

—La juna homo plaĉas al mi! —murmuretis Hiram.

Efektive en la kunsido kvazaŭ ekblovis freŝa aero. La generaloj rigardis scivole la pastron, eĉ la vizaĝo de l' Faraono viviĝis.

—Mia filo, ne aŭskultu lin! —petegis la reĝino.

—Kiel vi pensas? —diris subite Ramzes al la juna pastro: —Kion farus nun la sankta Samentu, se li vivus..?

—Mi estas certa —respondis energie la pastro —ke Samentu enirus en la templon de Ptah, bruligus incenson por la dioj, sed punus la perfidulojn kaj mortigintojn...

—Mi ripetas, ke vi estas la plej malbona perfidulo..! —ekkriis la reĝino.

—Mi plenumas nur mian devon —respondis la nekortuŝebla pastro.

—Vere, ĉi tiu homo estas la lernanto de Samentu..! —intermetis Hiram. —Li sola vidas klare, kio restas al ni por fari...

La militaj kaj civilaj altranguloj

konsentis, ke Hiram estas prava, kaj la granda skribisto aldonis:

—Ni komencis la batalon kontraŭ la pastroj, ni devas fini ĝin, tiom pli hodiaŭ, kiam ni havas la leterojn pruvantajn, ke Herhor traktis kun Asirianoj, kio estas granda ŝtata perfido.

—Li daŭrigas ja politikon de Ramzes XII —intermetis la reĝino.

—Sed mi estas Ramzes XIII..! —jam malpacience respondis la Faraono.

Tutmozis leviĝis de la seĝo.

—Mia sinjoro —diris li —permesu al mi agi. Estas danĝera afero daŭrigi ĉi tiun staton de l' necerteco, kiu regas nun en la administrado, kaj estus krimo kaj malsaĝo ne profiti la okazon. La pastro diras, ke la templo ne estas defendata, permesu do al mi iri tien kun areto da homoj; mi mem elektos ilin.

—Mi iros kun vi —intermetis Kalipos. —Laŭ mia sperto la triumfanta malamiko estas plej malforta. Se do nun ni invados en la templon de Ptah...

—Ni ne bezonas invadi, ni eniros tien, kiel plenumantaj de la volo de l' Faraono, kiu ordonas al vi aresti la perfidulojn —diris la granda skribisto. —Por tio oni ne bezonas eĉ forton. Kiom da fojoj unu policisto sin ĵetas sur bandon da ŝtelistoj kaj kaptas, kiom li volas.

—Mia filo —interrompis la reĝino —cedas al la premo de viaj konsiloj... Sed li ne volas superforton, li malpermesas al vi...

—Ah, se estas tiel —diris la juna pastro de Set —mi komunikos al via sankteco ankoraŭ unu aferon.

Kelkfoje li profunde spiris, sed malgraŭ tio li finis per sufokita voĉo:

—Sur la stratoj de Memfiso la pastra partio publikigas, ke...

—Kion..? —parolu sentime —interrompis la Faraono.

—Ke via sankteco estas frenezulo, ne havas la ĉefpastran rangon, eĉ la reĝan kaj ke... oni povas forigi vin de l' trono...

—Jen kion mi timis —murmuretis la reĝino.

La Faraono salte leviĝis de la seĝo.

—Tutmozis! —ekkriis li per voĉo, en kiu oni sentis la retrovitan energion. —Prenu tiom da soldatoj, kiom vi volas, iru en la templon de Ptah kaj alkonduku al mi Herhoron kaj Mefreson, kulpigitajn pri ŝtata perfido. Se ili pruvos sian senkulpecon, mi redonos al ili mian favoron, en la kontraŭa okazo...

—Ĉu vi pripensis..? —interrompis la reĝino.

Tiun ĉi fojon la indigninta Faraono ne respondis al ŝi, kaj la altranguloj

komencis krii:

—Morto al la perfiduloj..! De kiam en Egipto la Faraono devas oferi siajn fidelajn servistojn por almozpeti la favoron de l' friponoj..!

Ramzes donis al Tutmozis paketon de l' leteroj de Herhor al Asirio kaj diris per solena voĉo:

—Ĝis la sufoko de la ribelo de l' pastroj, mi transdonas mian povon al Tutmozis, la ĉefo de la gvardio. Nun lin vi obeu, kaj vi, respektinda patrino, al li vin turnu kun viaj rimarkoj.

—Saĝe kaj juste agas la sinjoro..! —ekkriis la granda skribisto. —Ne konvenas al la Faraono lukti kontraŭ la popolaĉo, kaj la manko de energia povo estus pereiga por ni.

Ĉiuj altranguloj sin klinis antaŭ Tutmozis. La reĝino Nikotris kun ĝemo falis al la piedoj de l' filo.

Tutmozis, akompanata de la generaloj, eliris en la korton. Li ordonis al la unua regimento de l' gvardio stariĝi en vicoj kaj diris:

—Mi bezonas kelkdekon da homoj, kiuj estas pretaj morti por la gloro de nia monarĥo...

Eliris el la vicoj pli multe da soldatoj kaj oficiroj, ol oni bezonis, kaj en ilia fronto Eunana.

—Ĉu vi estas pretaj morti? —demandis Tutmozis.

—Ni mortos kun vi, ĉefo, por lia sankteco..! —ekkriis Eunana.

—Vi ne mortos, sed venkos la malnoblajn krimulojn —respondis Tutmozis. —La soldatoj, partoprenantaj en la ekspedicio, ricevos oficiran rangon, la oficiroj ricevos avancon je du gradoj. Tiel diras al vi mi, Tutmozis, la ĉefa militestro laŭ la volo de l' Faraono.

—Vivu eterne..!

Tutmozis ordonis jungi ĉevalojn al dudek kvin ĉaroj de la peza kavalerio kaj sidigis tie la memvolulojn. Li mem akompanata de Kalipos sidiĝis sur ĉevalojn, kaj baldaŭ la tuta taĉmento, sin direktanta al Memfiso, malaperis en la polvo.

Vidante tion el la fenestro de la reĝa somerdomo, Hiram sin klinis antaŭ la Faraono kaj murmuretis:

—Nur nun mi kredas, ke via sankteco ne estis en konspiro kun la ĉefpastroj...

—Ĉu vi freneziĝis..? —eksplodis la sinjoro.

—Pardonu, estro, sed la hodiaŭa atako kontraŭ la temploj estis aranĝita de la pastroj. Kiel ili entiris en ĝin vian sanktecon? tion mi ne komprenas.

Estis jam la kvina horo post la tagmezo.

# Kajeroj el la Sudo

Bulteno de Hispana Asocio
de Laboristoj Esperantistaj

http://www.gazetoteko.com/hale/kels117.pdf

Numero 117a - Oktobron 2020




ISSN 1886-1938 (printita)
ISSN 1886-1997
Depósito legal: Z-2398-88